

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro

PENSO KAJ LABORO POR LA UNIVERSALA FRATECO

DIREKTORO: DELIO PEREIRA DE SOUZA

ĈEFREDAKTORO: LASZLO ZINNER

JARABONO

BRAZILO — Cr\$ 20,00
Eksterlande — U\$ 1,50
Aŭ 15 Respondokuponoj
Ekzemplero — Cr\$ 2,00

RIO DE JANEIRO, MAJO, 1948.

JARO II

Monata eldono

N.º 14

Adreso: Caixa Postal 3677

Redakcio kaj Administrejo
Rua das Marrecas, 19, 2.º and
Telefona 22-5300

ESPERANTO SIMPLIGITA

Nia gazeto ricevis cirkuleron de pastro John Kubacki, sekretario de Simpligita Esperanto-Klubo. Ne estis nia intenco skribi nek ektuŝi la temon, sed kelkaj samideanoj demandas nin pri ĝi, kaj ni ricevis eĉ favoran artikolon de samideano el Catalão, Stato Goias, jen kial ni decidis deklari la sekvanton.

La batalantoj por nia movado tre bone scias per kiongrada streĉo kaj laboro ĝi estas farata, kaj tre bone komprenas kion da malbono kaŭzos al ĝi la kampanjo de pastro Kubacki. Ni ne dubas pri lia sincereco, sed lia propono montras, ke li estas nur teoriulo. Nia movado en Ameriko estas ege malforta, kaj en Eŭropo, malgraŭ la postmilita granda progreso, ĝi estas ne forta ankoraŭ. Tio estas montrita per la neakcepto de Esperanto oficiale en la lernejoj kiel deviga studobjekto.

Kion profitos la esperantistaro pro la ŝanĝoj proponitaj de samideano Kubacki? Se estas iom malfacile al kelkaj samideanoj uzi la supersignojn, precipe je la maŝinskribado, multe pli malfacile estos por kelkaj uzi la literoj w, q, x, y. Kaj kial? Ĉar en multaj naciaj lingvoj tute mal estas ĉi tiuj literoj kaj ne troviĝas sur la skribmaŝinoj. La supersignoj oni almenaŭ povas surmeti permane. Nu, kiajn simpligojn proponas nia klera samideano? Neniajn; nur ŝanĝoj de literoj, al kiuj devus alkitimiĝi miloj da esperantistoj. La brazilanoj, ekzemple, laŭ la portugala parola kaj skribmaniera uzado, spertas ja pri ŝanĝoj en ilia nacia lingvo, kaj ili bone scias pri la faoso tiamaniere kaŭzita al la lingvo. La tuta ĝistiam


literaturo estiĝis arĥaika, la ple-naguloj devas lerni denove, la infanoj ne povas legi malnovajn librojn.

Ĝis kia grado malhelpos nian

movadon la kampanjo proponita? Tion ni ne povas antaŭvidi, sed se multaj samideanoj deflankiĝos de la laboro pri propagando kaj instruado de la lingvo kaj skri-

Gesinjoroj Sterafina kaj Dragutin Wranka en Rio

Survoje al Ĉilo, S-ano Wranka, konata desegnisto de la plej interesa esperanta revuo "La Praktiko" alvenis al Rio de Janeiro, kie li estis bonvenita de la anoj de Asocio Esperantista de nia ĉefurbo. Regas granda ĝojo inter la "kariokaj" esperantistoj, ĉar samideano Wranka estas bonega esperantisto, jam veterano. Lia edzino, ankaŭ bona esperantistino, estis iam lia lernantino. Gesinoroj Wranka iĝis esperantistoj en ilia hejmlando, Jugoslavujo. Post sia alveno, la geedzoj Wranka vizitis jenajn esperantistajn centrojn: Brazila Ligo Esperantista, Asocio Esperantista de Rio de Janeiro kaj Espe-



ranto Klubo ĉe la Asocio de Kristanaj Junuloj. En la du lastaj centroj S-ano Wranka faris paroladojn. Dum la monato junio ili devas daŭrigi la vojaĝon, intertempe S-ano Wranka faros diversajn demonstraciojn publikajn pri la Cseh-metodo en diversaj lokoj prizorgitaj de nia Asocio. Plurajn detalojn ni raportos en nia sekvonta eldono. Bonvenon al gesinjoroj Wranka!

bos, batalos favore aŭ kontraŭ la propono, nia movado plimalfortiĝos. Tio, ja, povas kaŭzi grandan skizmon, tre similan al tiu, kiu okazis en la fino de la pasinta jarcento. Tuj post la apero de Esperanto ĉiu sin ekopinis rajta fari proponojn pri ŝanĝoj celante plibonigi kaj plibeligi la lingvon. La interesatoj pri la temo povas legi kelkon en la libro "Historio de Esperanto", verkita de S-ro Edmond Privat. Kaj kion finfine proponis Zamenhof? Jenon: "La sola, unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj, fundamento de nia lingvo Esperanto estas la verketo "Fundamento de Esperanto" en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝojn".

Tiun vojon ni sekvu nun. Estas ankoraŭ frue, tre frue, enkonduki ŝanĝojn en la lingvon. Ĝi restu sensange ĝis kiam ni ĝin transdonos al la registaroj aŭ al la tutmonda registaro... se ĝi jam ekzistos tiu epoko. Ni ne devas malŝpari tempon kaj energion nek perdi lokon sur la paĝoj de nia organo por disputado pri ŝanĝoj, ĉu oni uzu ŭ aŭ w, q anstataŭ ĉ, ktp.

Ke ĉiu bone nin komprenu!

Memorkunveno

La 14-an de aprilo, por rememori la datrevenon de la morto-tago de nia Makstro, la Asocio Esperantista de Rio de Janeiro okazigis kunvenon dum kiu oni inaŭguris novan kurson gvidotan de D-ro Braz Cosenza. Dum la solenaĵo parolis S-anoj Délio Pereira de Souza, kaj D-ro Braz Cosenza. Ankaŭ parolis; D-rino Ilka Duque Estrada, S-ano Laszlo Zinner kaj S-ano Otaviano da Silva Lopes.

RECENZO

Al tiuj, kiuj, same kiel ni, tre malmulton scias pri Svedujo kaj precipe pri ĝia interna politiko, estas utile kaj oportune legi la bonan libron titolita "Sveda Laborista Movado" kiu multon klarigas al ni pri la politika vivo en tiu lando.

Ĝin leginte, oni ekvidas kiamaniere la sveda popolo ekmarŝis al la socialismo kaj senbrue, sen fanfaronado, praktikas eble la plej imitindan demokration, en kelkaj aspektoj tre malsimile al la landoj kiuj proklamas, ke nur ili ĝin praktikas.

La aŭtoro, S-ro Tage Linbom, sperte nin kondukas de la unua fazo de la movado, kiu estis starigo kaj fondo de la sindikatoj kaj ties Unuiĝo (LO), ĝis la nuna firma pozicio de la socialdemokrata partio kies kernon kaj plimulton, laŭ la libro, konsistigas laboristaro kaj kiu ludas eble la plej gravan kaj decidigan rolon en sveda politiko.

Humanan trajton donas al la verko la sciigo, ke en Svedujo ankaŭ okazis strikoj, ankaŭ estis mortpafitaj homoj kaj, ke, en tiu lando, oni ankaŭ kritikis kaj atakis indulgeman agadon de la registaro rilate al nazi-Germanujo. Ni ankaŭ menciis la sciigon pri la klopodoj de la sveda laboristaro starigi, pere de socialdemokrata partio, interkonsentojn inter la laboradantoj kaj la laboristaj sindikatoj, ties kolektivajn sindikatojn kaj kelkajn notojn pri sveda parlamento.

Oni ja povas fini ĉi tiun recenzon simple ripetante la jenan frazon de la libro, pri demokratio kaj ekonomia vivo: "La klopodoj de la sveda laborista movado ĉiam direktiĝis al politika, ekonomia kaj kultura altigo de la nefavoritaj grupoj de la popolo — ĉefe de tiu de la laborista klaso — ke ili fariĝu egalaj kaj egalrajtaj al aliaj klasoj en la socio".

Nu, laŭ la forpaso de la tempo, oni povos juĝi ĉu sveda laboristaro sukcesis aŭ ne, kaj en kia grado, enkonduki socialigon de la lando.

La libro, eldonita de Sveda Laborista Esperanto Asocio, estas bone presita, alloga kaj la tradukinto, S-ano Martin Johansson, stokholma tramisto, posedas bonajn stilon kaj lingvon. Sufiĉa kvanto da fotografiaĵoj kaj portretoj de la ĉefaj gvidantoj

Trovas populares

Antonio Caetano Coutinho

Já se tem citado a vasta quantidade de obras literárias em Esperanto, originais e traduzidas. Na verdade, o Esperanto presta-se magnificamente para interpretar com fidelidade e expressão as obras mais célebres da literatura mundial, sejam as clássicas, como a Bíblia, a Ilíada, de Homero, a Comédia, de Dante, o Hamleto, de Shakespeare, o Avarento, de Molière, o Quo Vadis, de Sienkiewicz, sejam as mais modernas, como as de Chesterton, de Wells, Tristan Bernard, etc.

Pois bem. As modestas quadras do povo, as trovas que passam de boca em boca, transportadas para o Esperanto, conservam o mesmo natural encanto primitivo.

As primeiras traduções de trovas portuguesas publicadas são de autoria dos esperantistas portugueses Drs.

en la movado ilustras la libron tre belaspektan.

* * *

GALILEO GALILEI. — Jen la verko kiun ĉiu el ni devus atente tralegi kaj pri ĝi ekmediti. Tamen, ni klarigu, ke ĝi ne estas ververe verko sed prelego farita de profesoro Bento de Jesus Caraça en la salono de la Popol-Universitato, en Lisbono, dum la jaro 1933.

La prelegisto komencas ekde kriza vivperiodo de la granda itala astronomiisto kaj scienculo, kiam li estis juĝata de la pastraro, reprezentanta la ĉiampotencan romkatolikan Eklezion, kaj devigata malkonfesi sian opinion pri la rondirado de la ĉielaj korpoj. Estas, ja, la ĝis nun tre aktuala temo: la batalo inter la racio kaj scienco kontraŭ la malprogresema pastraro gvidata de la Sankta Seĝo. La verko ne priskribas precize la biografion de Galileo; ĝia ĉefa celo estas priskribi la ideobatalon inter la progreso (scienco) kaj la malprogreso (sintendado de la tiama Eklezio), inter la hipotezoj de la heliocentrismo kaj la geocentrismo.

Estis la kritikema kaj analizema greka spirito, kapabla krei hipotezojn, kiu, pere de siaj plej

Costa e Almeida e Albano Magalhães. Vejamos algumas delas:

**"Meus olhos se acostumaram
A namorar tanto os teus,
Que de tanto confundí-los
Já não sei quais são os
[meus]"**

O Dr. Costa e Almeida assim a traduziu:

**"Miaj okuloj kutimis
Celi senĉese al viaj,
Kaj vere plu mi ne scias
Kiaj nun estas la miaj"**

★

— Em relação a esta:

**"Por teu amor perdi a Deus,
Por teu amor me perdi;
Agora, vejo-me só,
Sem Deus, sem amor, sem ti"**

Albano Magalhães disse:

"Pro amo mi perdis Dion,

eminentaj reprezentantoj de la Elea Skolo; Anaksagoro, Filolao, Heraklido, Ekfanto kaj Aristarko, malvolviĝis, tra la eldiroj kaj opinioj de Koperniko kaj Kepler, en la epoko de Galileo kaj igis lin anonci, siavice, lian teorion kaj... esti poste solene juĝata de la Eklezio.

Kiel trafa peco, tuŝis nin tiu parto de la prelego en kiu la aŭtoro certigas, ke "... la progreso de l' scienco plenumiĝas per akiro, per konstanta aldono de novaj ideoj al ĝia fronto, sed la progreso de l' religio (t.e. de la Eklezio, laŭ nia kompreno) okazas, inverse, per forlaso, ĉe ĝia posto, de fantomaj ideoj, kies plua konservado fariĝis jam neebla". Estas la eldiro kiun ĉiu, laŭ sia plaĉo, povas, aŭ ne, konstati.

En bona traduko de nia laborema S-ano Manoel de Freitas, klare presita sur bona papero, la verko meritas lokon en libroŝranko de ĉiu progresemulo kaj ni nur povas altvoĉe laŭdi kaj gratuli, por eldono de ĝi, la Portugalan Eldonan Rondon, kiu, iom post iom, pliriĉigas nian literaturon per altvaloraj, kvankam negrandaj, verkoj.

Kobo.

Pro amo min perdis mi;
Nun mi estas forlasita,
Sen Di', sen amo, sem vi".

E esta:

**"O' luar da meia noite,
Tú és o meu inimigo:
A porta do meu amor
Eu não posso entrar contigo"**

Assim passou para o Esperanto:

**"Lunbrilo de l' meza nokto,
Vi kaŭzas malĝojon al mi:
La pordon de l' amato
Mi ne transiras pro vi"**

Entre nós, o Prof. J. B. Mello e Souza tem sido o tradutor, por predileção, das trovas. Uma das mais conhecidas é:

**"Até nas flores se encontra
A diferença da sorte:
Umás alegram a vida,
Outras enfeitam a morte"**

Assim traduzida em Esperanto:

**"Ĉe en la floroj troviĝas
La diferencoj de l' sorto:
Unuj beligas la vivon,
Taŭgas aliaj por morto"**

★

Outra:

**"Du mil unu steloj brilas",
Saĝul' diras; tamen, mi
Memorinte okulojn viajn:
"Du mil tri"**

Encontrei-a nas "Trovas de Espanha", do Conde Afonso Celso, na seguinte forma:

**"Mil e sete estrelas conto",
Diz o sábio, e há que o
[aprove;
Mas os teus olhos lhe aponto:
"Mil e nove"**

★

E não entrou na conta a estrela verde do Esperanto.

(Transcrito de "Juventude Unida").

LA LASTA MILITO

Alvenos iam tempo, dum la homar' malsaĝa,
Lastfoje priregita de krima murd-ekscit',
Kunvenos stimulte de sang-avid' sovaĝa,
Por lukti kaj pereji en lasta jam milit'!

Kaj tiu reciproka buĉado homamasa,
Dum mortos homanimo kaj kor' fariĝos ŝton',
Ne estos jam milito nacia, rasa, klasa...
Sed lukto de l' eterna Malbono kontraŭ Bon'!

Kunrampos moseanoj, kristanoj, antikristoj...
Stariĝos Pek' ĉe l' Vero, Malforto ĉe l' Potenc'...
Kunvenos komunistoj, faŝistoj, nihilistoj...
Saĝuloj kaj stultuloj... por buĉi sin sen senc'!

Sed tiam super bestoj per homaspekt' senhontaj
Rabiaj, sangsoifaj plenumos sin Mister',
Ĉar inter tiuj "homoj" sovaĝe sin buĉontaj,
Aperos Reĝ' Ĉiela kaj Reĝo de l' Infer'!

Enmeze de l' hombestoj la ambaŭ Reĝoj sidos
Kaj, laŭ de ambaŭ kune konkordigita plan',
Frenezan fihomaron je partoj du dividos —
Je anoj de la Dio kaj anoj de l' Satan'!

Kaj vidos ĉi-dividon justuloj kaj ekmiros,
Ekkantos al Juĝistoj belkanton de l' kordank',
Ĉar multo da kristanoj satanan flankon iros,
Kaj multaj "antikristoj" al Krista iros flank'!

Ekbojos maljustuloj, ekhurlos kaj ekmuĝos
Mordataj de malamo, kolero kaj incit',
Ĉar multajn komunistojn "faŝiste" oni juĝos
Faŝistojn "komuniste"... laŭ kulpoj kaj merit'!

Kaj kiam jam finiĝos proceso de l' Divido,
Armeon de l' Malbono ekskurĝos Dia Vip':
Malmulta Di-anaro atakos satanidojn
Kaj venkos Bon' Malbonon — laŭ Ver' de l' Sankta Skrib'!

Malvenkos la Damnitaj... neniu kaj nenio
Sukcesos kaŝi ilin de pun' de Dia man':
En fajra lag' infera, laŭ vortoj de Biblio,
Pereos la Malbono kun sia reĝ' — s a t a n' !!

Kaj tiam, dum sur tero ne regos best', sed HOMO,
Dum pasos jam por ĉiam Malbon'-de l' homo Dram',
Dum ĉesos pendi glavo de l' sanga Krimfantomo,
Ekregos Ibereco, Justeco, Ver' kaj Am'!

Eugeniusz Matwiejczuk.

Ĉu Modifi Esperanton?

Kvankam Esperanto estas la ĉefa verko de geniulo, ĝia aŭtoro, Zamenhof, estis homo tiel saĝa, ke li antaŭvidis eblajn modifojn farotajn, sed farotajn ne de tia "akademio" kiu, bedaŭrinde, pli efike funkcias kiel balasto aŭ bremsilo, malpermesante la necesan evoluon kaj, precipe, varbadon de novaj esperantistoj. Tio ja dependas de U.E.A. kiu ne kunvokas la akademianojn. Ankaŭ la plimulto de la esperantistoj kontraŭstaras iun ajn modifon, sed ĉu ili pravas? Vere estas, ke nemodifita Esperanto kontentigas tiun plimulton, sed ĉu tiu plimulto malcedas la kontraŭdirojn de la cetera parto de la mondo, ĝuste de tiu parto, kiu mankas al ni por ke Esperanto estu disvastigita universale kaj kiu, rilate nin, esperantistoj, estas kiel nia planeda mondo kompare al iu ajn malproksima steleto, kvankam ĝi verde lumetas.

Ŝajnas al mi, ke la kazo de aboco bone klarigas la aferon. Mi mem instinkte pravigas la kontraŭulojn ĉar kiam, ekzemple, mi estas legonta tekston presita sen la supersignoj, kiuj, permesite, interalie, de Zamenhof mem, estas anstataŭigataj per la litero "h", mi tuj forlasas la legadon kaj kredas, ke simile agas multe da esperantistoj. Inter la parentezoj; tio konfirmas la eldiron de la prezidanto Malmgren,

kui konsilas, ke malriĉaj gazetoj kunfandiĝu kun pli riĉaj.

Pro tio oni konstatas, ke, fakte, la manko de la supersignitaj literoj en la presejoj malhelpas la propagandon en malriĉaj esperanto-medioj. Konsekvence, ĉu pastro John Kubacki el Milwaukee, ŝtato Wisconsin, ne pravas proponante forigi la supersignon kaj la literon "ŭ"? Li proponas, ke oni legu "q" kiel "ĉ", "x" kiel "ŝ", "w" kiel "ŭ", "j" kiel "g" kaj "j" kaj ke oni forigu la literon "h". Mi opinias, ke la literoj "w", "x" kaj "y" estas enigebblaj, ĉar ili estas jam uzataj en aliaj lingvoj, kvankam, lingvistike, mi kredas, ke la litero "q" ne povas anstataŭigi la literon "ĉ" (mi sugestus ĝin anstataŭigi per la litero "c") kaj ke malfacile oni povas imagi al si literon "j" soni, samtempe, kiel "ĝ" aŭ "ĵ". Pri forigo de "h", post kiam la afero pri "horro" estus solvita per la uzo de "koruso", kiel jam montras la vortaro de samideanoj Couto Fernandes kaj Carlos Domingues, neniu tion kontraŭstaras.

Nu, oni devas pripensi: ĉu ne pli bone estus modifi Esperanton por povi pli efike varbi la ne-esperantistojn, ol ilin ne varbi, kontentigante la malnovajn esperantistojn?

René Estevam Deckers.
Catalão. Ŝtato Gojaz.

ESPERANTO KULTUR-SERVO

BUDAPEŬTO — HUNGARUJO

Filatelaĵoj, hungaraj poŝtmarkoj, maksimumkartoj,
ĉiuspecaj esperantaĵoj.

BRAZILA REPRESENTANTO: NELSON DE SOUZA
CAIXA POSTAL 5117 —) :: (— RIO DE JANEIRO

PROLAR S. A.

— — — Rua 7 de Setembro, 99 — — —
— — — RIO DE JANEIRO — — —

Nia Redakcio Ricevis la Jenajn Eldonaĵojn

Jarlibro de S.A.T. — La unua postmilita eldono kiu enhavas la statuton de S.A.T. kaj la adresaron de la satanoj en multaj landoj.

Urbo São Paulo. — Organizaĵo de São Paulo Esperanto-Klubo kaj eldonita de Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko estas libreto pri aspektoj de tiu ĉefurbo. Ĝi estas bona, bela kaj efika propagandilo pro ĝia lerte elektita bildaro. La broŝuron oni eldonis celante memori la 11-an Brazilan Kongreson de Esperanto okazinta pasintjare en tiu urbejo. En portugala kaj esperanta lingvoj.

* * *

Donacite de Brazila Ligo Esperantista nia Asocio ricevis du volumojn. La unua, dika, 267-paĝa volumo, titolita "Statistika Resumo pri Brazilo dum 1946", estas libro enhavanta tri paralelajn tekstojn en la lingvoj: Esperanto, portugala kaj angla. Ĝi liveras grandan nombron da utilaj por la fakuloj, informoj statistikaj pri nia lando.

La dua volumo estas titolita (portugallingve) "Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko kaj Esperanto". Ĝi tiu volumo estis presita por kaj dediĉita al la 4-a Kongreso de Esperanto en Argentina Respubliko, en 1947. La libro, portugallingve presita, enhavas, interalie; Preĝo'n de la Libera Homo, verkita de Franklin Delano Roosevelt kaj lian portreton, Antaŭparolon de l' Bulteno Memoriga de la Ekspozicio Nacia de 1908 (en Esperanto), artikolon "Kio Estas Esperanto?" kune kun skizo pri esperantista ideo kaj la resumo gramatiko de nia lingvo kaj, ankaŭ, portreto de nia Majstro, Malgrandan Statistikan Terminaron, notojn pri la Dekaj Bra-

zila Kongreso de Esperanto kaj du artikolojn pri la antaŭnelonge mortinta S-ro Alberto Couto Fernandes (unu el ili en Esperanto) kaj ties portreto.

Ambaŭ volumoj estis ellaboritaj kaj presitaj de Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko. Ĝi tie ni deziras enregistri nian elkoran dankon, pro la donaco, al Brazila Ligo Esperantista.

* * *

El urbo Florianopolis, Stato Santa Catarina, ni ricevis libreton titolita "Esperanto en Statistiko — Ĝia Graveco".

Temas pri la klopodoj de Esperantista Klubo de tiu urbo enkonduki Esperanton en Brazilan Instituton de Geografio kaj Statistiko pere de Statistika Societo de la Stato Santa Catarina.

La libreto, laŭ kion diras la titolo, pritraktas temon de Statistiko kaj de ĝia graveco. Ĝi ankaŭ enhavas kopiojn de kelkaj oficialaj ŝtataj dokumentoj kaj en ĝia lasta parto troviĝas fotografioj montrantaj oficejon de la Statistika Societo en urbo Florianopolis kaj ties fakojn.

* * *

El Bulgarujo, venis al ni en la manojn propaganda afiŝo pri starigo de publika Esperanto-kurso ĉe la Artlernejo, en ĉefurbo de tiu lando. La afiŝo, kiu estas 51 x 63 centimetroj granda, sciigas nin pri la inaŭguro de dumonata kurso, la 25-an de oktobro, 1947. Ĝi ankaŭ sciigas, ke la kurso estis laŭleĝe permesita de Ministro pri Popola Klerigo kaj gvidata de S-ano Dimitri Ivanov kiu, dum la kursmalfermo, faris publikan pruvlecionon. Al S-ano Ivanov ni elkore deziras, ke li sukcesu altiri multajn personojn al tiu kurso.

USONAJ MONDVOJAĜANTOJ ALVENONTAJ AL RIO

Laŭ la informo sendita de S-ano Hermes Pitta el urbo Salvador, S-ano D-ro Borges Bahia, prezidanto de la Esperanto-Grupo en tiu ĉefurbo, ricevis leteron de usonaj samideanoj gesinjoroj Walter D. Gilkey en kiu ili lin sciigas pri ilia alveno al Rio de Janeiro la 21-an de junio. Gesinjoroj Gilkey estas esperantistoj kaj nun kompletas sian vojaĝon ĉirkaŭ la mondo. La lasta etapo de ilia vojaĝo estas Rio de Janeiro de kie ili ekvojaĝos, per aviadilo, al ilia hejmolando, Kalifornio. Jen la nomoj de la etapoj kiujn ili traveturis elirinte el Los Angeles: Manila, Ŝanhaj, Hongkong, Singapore, Durban, Sud-Afriko, Kenjo, Cape Town, Buenos Aires, Montevideo, Santos kaj Rio de Janeiro. Dum la tuta vojaĝo gesinjoroj Gilkey uzas nian lingvon, Esperanton.

ALDINO DE FREITAS

Ĉagrenitaj, ni sciigas al niaj samideanoj, ke nia tre ŝatata asocio, Aldino de Freitas, forvojaĝis, pro malsano, al urbo Belo Horizonte, la 20-an de la monato kuranta.

Ni vere bedaŭras tiun okazintaĵon, ĉar Aldino estas unu el la plej sindonaj, viglaj kaj yleraj batalantoj por nia movado.

Senlace laborante por la konstruado de la nova, pli bona mondo, kiun ni ĉiuj, gesperantistoj, celas kaj atendas, Aldino estis neatendite frapita de tiu malsano ĝuste kiam li gvidis la perfektigan kurson de nia lingvo ĉe la Spiritisma Federacio.

Ni, do, senpacience atendas resaniĝon kaj revenon de tiu neanstataŭigebla disĉiplo de Zamenhof en nian familian rondon.

Por ke revenu al ni la trankvileco, ni deziras, ke ĉi tiu nia fervora kaj justa deziro plenumiĝu, se eble plej baldaŭ.

SCIIGO

Dum gravaj momentoj por la minacata paco ni mobilizu ĉiujn niajn spiritajn fortojn kaj ekuzu Esperanton kiel ilo celante interkomprenigi la homojn. Konata eldonanto de la Esperantaj koroj eldonos novajn porpacajn glumarkojn. Proponoj pri ideoj kaj mendoj estas bonvenataj. Adreso: "Esperanta Koro", Lanskroun Ĉeĥoslovakujo.

RICEVITAJ PUBLIKIGAĴOJ

Ekde nun ni ne plu publikigas la titolojn de la ricevitaĵoj gazetoj, revuoj kaj ĵurnaloj. Ilin ni jam regule ricevas.

Comprar bem Camisas, Robes, vestons e Pijamas



SO' NO

O CAMIZEIRO

Tra La Mondo

BELGUJO. — Dum la festoj de la 500-jara ekzistado de la urbodomo en Leuven, okazos en tiu urbo diversaj solenaĵoj, procesioj kaj ekspozicio. Oni estas aperigonta interesan broŝuron, parte en Esperanto, pri la historio kaj folkloro de la urbo kaj kelkajn flugfoliojn tute en nia lingvo. Oni petu informojn ĉe S-ro H. J. Boving. Kapusiene Voer, 104. Leuven.

BRITUJO. — Por la Dua Internacia Muzikfestoj kaj Ĥorkonkurso en Llangollen (Kimrujo) oni presigis Esperanto-programon, klopodas starigi Esperanto-konton kaj invitos 4 eminentajn esperantistojn por esti honoraj vicprezidantoj. La festo realiĝos de la 15-a ĝis la 20-a de junio, 1948. Petu prospektojn de S-ino Rosetti. Pontcŭ. Wrexham.

La konferenco de "Internaciaj Militrezistantoj" okazos de la 5-a ĝis la 9-a de aŭgusto, 1948, en Albrigh-ton Hall, Broadoak, Shrewsbury, Shropshire.

ITALUJO. — **Milano.** — Laŭ "Verda Steleto", funkcias 3 kursoj ĉe vespera komunuma lernejo por fremdaj lingvoj kaj turismo, kie oni instruas Esperanton kiel deviga studobjekto. Ankaŭ funkcias unu kurso en la sama lernejo por la instruistoj. Estas ankaŭ du kursoj en la taga teknika ŝtatlernejo kie Esperanto estas nedeviga studobjekto. Funkcias du vesperaj kursoj en la komunuma lernejo por fremdaj lingvoj kaj kelke da vesperaj kursoj en privataj rondoj. La menciitajn kursojn gvidas samideanoj: Prof. Ippolito Pia Pugno kaj S-ro Quarone.

Padova. — Esperanto estas vigle instruata ĉe la katolikaj skoltroj de S-ro G. Saggiori kaj en la universitata gastejo F. Petrarka de D-ro Camillo Marini.

Romo. — La ĉiusemajna gazeto "La Progreso" aperigis interesan artikolon kun longa raporto pri la antaŭnelonge okazigita Katolika Kunveno. Krome, la artikolo substrekas la gravecon de la venonta Internacia Kongreso de Katolokoj-Esperantistoj en tiu urbo, en 1950. Nia samideano, pastro Kaolfi, senĉese laboradas en katolikaj rondoj.

La 2-an de februaro, S-ano Rag E. Filippi komencis lian trian kurson de Esperanto ĉe la Asocio de Kristanaj Junuloj "YMCA)..

Torino. — Nia lingvo estas instruata en la teknika lernejo ĉe la fabrikejo Fiat de la fraŭlino M. Finotto. D-ro Borione gvidas la kurson en katolika societo. La redaktoro de la "Verda Steleto" gvidas perfektigan kurson en profesia komerc-lernejo E.N.A.L.C.

HISPANUJO. — La hispana registaro oficiale permesis restarigon de la Esperanto-organizo. Hispanaj samideanoj fervore preparas la fondotan Hispanan Esperanto-Federacion. Pri la rilatoj kun esperantistaro ili sciigas, ke estas malpermesite interrilati kun Japanujo, orienteŭropaj landoj kaj speciale avertas germanajn samideanoj, ke tute ne eblas interrilato kun tiu lando. Adreso: Hispana Esperanto-Federacio. Valencia. Lauria 20.I.

ĈEĤOSLOVAKUJO. — "Esperantisto Slovaka" sciigas pri la jenaj Esp. kursoj: Turc. SV Martin — Esperanto estas instruata al ĉirkaŭ 300 gelernantoj de la lokaj lernejoj. En Bezovce oni gvidas la kurson por la 33 gelernantoj de la supera popollernejo. En Presov estas kurso en la 2-a ŝtata gimnazio por 56 gelernantoj.

DANUJO. — La lernejo Norskov Skole enkondukis Esperanton kiel deviga lernobjekto.

J U N E C O

Verkis Frank Crane

Juneco ne estas epoko de la vivo; ĝi estas animstato. Ĝi ne prezentas ruĝajn vangojn kaj lipojn nek flekseblajn artikojn; ĝi estas temperamento de la volo, eco de la menso, fortikeco de la emocioj. Ĝi estas la freŝeco de la profunda printempo de la vivo.

Juneco estas regado de la kuraĝo super la timemo de la karaktero; forta deziro al la aventuro superanta la inklinton al la mallaboremo. Ĉi tio pli ofte okazas ĉe la kvindekjara ol ĉe la dudekjara homo.

Neniu maljuniĝas pro la travivado de iu nombro da jaroj. Oni maljuniĝas kiam forlasas la idealojn. La jaroj sulkgigas la haŭton, sed la manko de entuziasmo sulkgigas la animon. La doloro, la dubo, la memmalfido, la timo de l' malespero, jen estas la jaroj kiuj tordigas la koron kaj kondukas la florigintan spiriton en la regnon de la ombroj.

Estu oni dekseks- aŭ sesdekjara, ĉiam ekzistas, en ĉiu homa koro, impulso al la aventuro, milda miro pri la steloj, infaneca kaj neniam

neita revado pri la estonteco kaj ĝojo en la vivo.

Oni estas same juna, kiel estas sia fido; same maljuna, kiel estas sia dubo; same juna, kiel sia memfido, same maljuna, kiel sia timo; same juna, kiel estas sia espero; same maljuna, kiel estas sia malespero.

En centra parto de homa koro estas arbo ĉiam floranta — ĝia nomo estas Amo. Dum la arbo havas florojn, la koro estas juna. Se la arbo mortas, la koro maljuniĝas.

En centra parto de la homa koro estas radistacio. Dum en tiu radistacio oni ricevas dissendaĵojn pri beleco, espero, ĝojo, grandiozeco, kuraĝo kaj potenco de la Tero, de la homoj kaj de la estonteco, ĉiu estas juna. Sed kiam tiu radistacio ĉesas funkciadi kaj la centra parto de la koro sin kovras per la neĝo de la egoismo kaj per la glacio de la pesimismo tiam oni estiĝas maljuna kvankam estas dudekjaraĝa.

En ĉi tiu okazo, Dio kompatu tiun animon!

Esperantigis **Enio Hugo Garrote** — **Rafaela** — Argentino.

DÓR • RESFRIADOS
GUARAINA
NÃO ATACA O CORAÇÃO
 UM PRODUTO • RAUL LEITE •

A. S. REZENDE

— *Ingeniero* —

projektoj kaj antaŭkalkuloj por loĝdomoj
 luksaĵ, hoteloj, hospitaloj, lernejoj, kaj
 aliaj konstruaĵoj.

Informpetoj en lingvoj portugala, franca,
 ————— angla kaj Esperanta —————

Adreso: Caixa Postal 2917

Rio de Janeiro

—————
 Brazilo

LASTAJ NOVAĴOJ

Asociano, Prof. Rossini Lopes da Fonte, direktoro de la kolegio "N. S. do Brasil", edziĝis kun F-ino Maria Orquidea Pinto Martins, la 24-an de aprilo. La religia ceremonio okazis en la preĝejo Bom Jesus da Penha en ĉi tiu urbo. La Asocion reprezentis S-ino Arlette Costa de Souza, edzino de nia prezidanto. Al la novaj geedzoj ni deziras longdaŭran feliĉon.

* * *

La Estaro de la Asocio decidis denove restarigi la fakojn: Kulturalan kaj Instruan kaj petis gesamideanojn Laszlo Zinner kaj D-ino Ilka Duque Estrada gvidi la koncernajn fakojn. Ili ambaŭ akceptis le taskon. Cetere, la kultur-kunvenoj okazas denove en nia ejo ĉiusabate kiujn partopreni ĉi estas invitata. Ankaŭ ĉiusabate en la ejo S-ano 15-a horo, komencantojn. Krom tiu, D-ro Braz Cosenza ankaŭ instruas la komencantojn.

Ĉiumerkrede ja al 18-a kaj duono, S-ano Délio Pereira de Souza donas la kurson por la progresantoj. Ĉiuĵaŭde okazas kunveno de la instruistoj kun celo pridiskuti lingvajn aferojn.

* * *

Alvenis al Rio F-ino Daisy Leal Paixão Lucas, esperantistino el urbo Juiz de Fora, Stato Minas Gerais, kiu restadis inter ni dum dek tagoj. Ŝi estas korespondanta lernantino de Prof. Roberto das Neves. La Asocio, por ŝin honoro, organizis ekskurson kiun partoprenis multaj samideanoj kaj amikoj. Ŝi iĝis anino de nia Asocio kaj, laŭ ŝia promeso, espereble baldaŭ revenos al Rio por efike kunlabori pri la disvanstigo de nia lingvo.

* * *
Esperanto-Klubo ĉe Kristana Asocio de la Junuloj en ĉi urbo, nin ciigas pri la nomoj de la novelektita estraro de tiu Klubo. Prezidanto — Professore Jozefo Joels; Ĝen. Sek. — D-ro Alberto Bonfim; Unua sek. — S-ro Raimundo Xavier de Menezes; Dua sek. — Othon Crespo Nunes; kasisto — Geraldo Loureiro Torres. Ĉiuj samideanoj estas kore invitataj partopreni la ĉi-semajnajn kunvenojn de la Klubo kiuj okazas ĉiuvendrede je la 19-a horo kaj duono en la ejo kie baldaŭ ekfunkcios senpagaj diversgradaj Esperanto-kursoj sub la ĝenerala gvidado de Professore Jozefo Joels. Dejorantoj ĉeestas ĉiulabortage de la 17-30 ĝis la 19-30 horo kaj sabate de la 13.00 ĝis la 15.00 horo.

KORESPONDI DEZIRAS

AŬSTRUJO. — S-ro Anton Konecny, temoj pri instruado. Hernalser Hauptstrasse 110, Wieu. XVII-107.

BELGUJO. — S-ro Scheldeman Alain, 18-jaraĝa, pri artoj, muziko, sportoj kaj kolektado. Itue Wahis 186, Menin (Fl.occ.) S-ro Lucien van den Briele, 18-jaraĝa, kun brazilaj gejunuloj pri ĝenerala kulturo, interŝanĝas revuojn kaj poŝtmarkojn. 18 Groenestraat. Boezinge.

BRAZILIO. — S-ro Paulo Oliveira Ludka, pri religio, moroj kaj aliaj temoj, interŝanĝas poŝtkartojn, Caixa postal 3677. Rio de Janeiro.

BULGARUJO. — F-ino Katerina Djulgerova, 20-jaraĝa, korespondos kun fraŭloj pri ĉiuj temoj. Mednikarska 3. Sofia.

DANKON!

Verkis Walt Whitman.

Antaŭ ol morti, ĉar jam pezas sur min la jaroj, mi volas danki... Dankon pro ĉio, kio al mi estis donita; brila suno, nepalpebla aero, la vivo mem...

Dankon pro agrablaj rememoroj pri miaj gepatroj kaj geamikoj, pro ĉiuj tagoj de mia ekzistado, ne nur la pacplenaj sed ankaŭ tiuj de luktoj; pro mildaj paroloj; pro la simpatiuoj; pro pano, akvo kaj la protekto.

Dankon ankaŭ al vi, ho, malproksimaj gelegantoj miaj, nekonataj, nenombreblaj, forperditaj en ombro de l' vivo... Neniam mi vidis vin, kaj kredeble neniam mi vin vidos... Tamen estis momento, kiam niaj animoj kunigis intime...

Dankon pro bonaj libroj, koloroj, formoj, noblaj agoj kaj la konsolajoj...

Dankon al vi, homoj anime fortaj kaj kuraĝaj, abnegaciemaj kaj maltimemaj kiuj bataladas pro la libereco en ĉiuj tempoj kaj regionoj... Kaj al la soldatoj de la klerigado, la plej herooj batalantoj de l' poezio kaj de la penso, generaloj de l' homa animo... dankon ankaŭ! Kiel soldato kiu hejmen revenas post la milito, kiel vojaĝanto inter miloj da nekonataj gekunuloj, mi diras al la granda procesio preterpasinta:

Dankon! Dankon el mia korfundo, plena je amo kaj ĝojo...

Laŭ hispana teksto esperantigis
F. Doblas Filho.

ĈEĤOSLOVAKUJO. — F-ino Anna Horová, instruistino, korespondos kun brazilano pri ĉiuj temoj. Karlovy Vary. Pošt. Schr. 153.

RIO ESPERANTISTA Propriedade da A.E.R.J. Um jornal do Rio para o mundo

*
Diretor responsável
Delio Pereira de Souza
Gerente.

Wilton Ribeiro
Redator-chefe
Laszlo Zinner
Redatores

Konstantino Blascikov
D-ro Braz Cosenza

EXPEDIENTE:

As importâncias referentes às assinaturas de RIO ESPERANTISTA, deverão vir em nome do nosso gerente, sr. Wilton Ribeiro, bem como quaisquer quantias, vales-postais, cheques, etc.

*
La gazeto rajtigas tutan liberon al ĝiaj kunlaborantoj kaj ĝi ne respondecas pro la enmetitaj konceptoj en artikoloj subskribitaj.

Estas permesata la reprecigo de la artikoloj, ĉu parte, ĉu tute — kondiĉe, ke oni citu la fonton.

RESPOSTAS DA REDAÇÃO

José Gomes da Silva — Recebemos sua carta de 29 de Abril de 1948, que não pudemos responder, porque V. não acrescentou o seu endereço. Atualmente não funciona curso algum na zona suburbana da Central do Brasil. Há um curso na Vila Kosmos, em Vicente de Carvalho (E. R. Rio Douró), que funciona aos domingos, às 10 horas da manhã, na rua Abagérú n.º 137. Se lhe servir...

FINFINE, APERIS LA 3a ELDONO DE PLENA VORTARO DE ESPERANTO

Verkita de la plej eminentaj Lingvo-Komitatoj k eldonita de S.A.T. (Sennacieca Asocio Tutmonda)
Foto-reprodukto de la 2a eldono. 512 x 12 paĝoj.
Formato 135 x 200 mm. plentole bindita.

Verko, utila al ĉiuj esperantistoj k nepre necesa al tiuj dezirantaj perfektigi en la lingvo.

Prezo (inkluzive la poŝtenregistron): Cr\$ 100,00, por ne — S.A.T. — anoj; Cr\$ 80,00, por S.A.T. — anoj.
MENDOJN AL S.A.T. — PERANTO: PROF. ROBERTO DAS NEVES — Caixa Postal 142 — Lapa — Rio de Janeiro

ESPERANTA MURKALENDARO

Ĉiamdaŭra, luksa, el bona ligno kaj kartono, laŭ la formato 30 x 20 centimetroj. — Prezo: Cr\$ 40,00.

Mendoj al ASSOCIAÇÃO ESPERANTISTA DO RIO DE JANEIRO, Caixa Postal 3677, Rio de Janeiro, Brazilo.

KONKLUDO

Lasta ĉapitro de la libro "La Naskiĝo kaj Morto de la Suno" verkita de Prof. George Gamov.

Antaŭ ol fermi ĉi tiun libron kaj turni sian atenton al iu amuziga mister rakonto, la leganto ŝatus, kredeble, ekzerci sian memoron pri la ĉefa konkludo de la verko kaj rekonsideri, per malmultaj frazoj, en la kronologiita ordo, la bildon kiun ĝi donis pri la evoluo de nia Universo je la lumo de moderna scienco.

La rakonto komencas pri la spaco unuforme plenigita per la nekredible varmega kaj densa gaso en kies interno la proceso de la kerna aliformiĝo de ties diversaj elementoj estis same simpla kiel kuirado de ovo en bolanta akvo. En tiu "prahistoria" kurejo de la universo, la proporcio de la malsamaj ĉemikaj elementoj — granda abundo de fero kaj oksigeno kaj malabundo de oro kaj arĝento — estis starigita. Al la sama frua epoko apartenas ankaŭ la formado de la longvivantaj radiumaktivaj elementoj kiuj ĝis la nuna epoko ankoraŭ ne disigis tute.

Sub la ago de supermezura premado de tiu varmega, kunpremita gaso, la universo komencis sin disvastigi dum la densa kaj la temperaturo de la materio samtempe malrapide ekmalpliĝis. Je certa stadio de sia disvastigo, la kontinua gaso disigis je izolitaj nuboj, neregulformaj, de malsamaj grandoj, kiuj baldaŭ alprenis al si regulajn, sferformajn aspektojn de apartaj steloj. La steloj estis ankoraŭ tre grandaj, pli grandaj ol ili estas nuntempe, kaj ne tre varmegaj. Tamen, la dua proceso de la pezoforta kuntiriĝo malpliigis iliajn diametrojn kaj altiĝis ĉe ili la temperaturo. La oftaj reciprokaj kolizioj inter la membroj de tiu praa stel-familio okazigis formadon de la multnombraj planetsistemoj, kaj en unu el tiuj kolizioj naskiĝis nia Tero.

Dum la steloj estiĝis pli kaj pli varmegaj kaj iliaj planedoj — pro tio ke ili restis malgrandaj kaj nekapablaj malvolviĝi altan centran temperaturon necesa por reagoj de kerna varmo — sin kovris per solida krusto, la "stela gaso", pleniganta unuforme la tutan spacon, daŭrigis sian disvastigon kaj la distancoj inter la steloj alproksimiĝis siajn nunajn mezurojn.

Dum la sekvinta stadio de sia disvastigo, koresponda al la mezgrada koncentriĝo ĝis nun trovebla interne de la apartaj "laktvojoj", la "stela gaso" disigis je apartaj, gigantaj nuboj de la steloj. Dum tiuj "stelinsuloj" troviĝis proksime unuj de la aliaj, ilia reciproka interagado, en multaj kazoj, rezultigis en la formado de la strangaspektaj, spiralfarmaj, rondaj blankoj kaj liveris al ili certan kvanton de rondira antaŭenpuŝo.

Ĉirkaŭ tiu epoko, la plimulto de la steloj kiuj konsistigis tiujn disvastigantajn "stelinsulojn" iĝis, en sia interna parto, sufiĉe varmega por povi eligi diversajn reagojn kernovarmajn inter la hidrogeno kaj aliaj malpezaj elementoj. Unue deuterio (la peza izotopo de hidrogeno), poste litio, berilio kaj, fine, borono (ne metala elemento abunde troviĝanta en borakso) estis faritaj en "cindroj" (la kerna "cindro" estas la bone konata gaso heliomo); kaj, trapasinte tiujn diversajn fazojn de la malvolviĝo de "ruĝaj gigantoj", la steloj alproksimiĝis la ĉefan kaj plej longan parton de ilia evoluo. Kiam ĉe ili ne plu restis malpezaj elementoj, la steloj komencis aliformigi sian hidrogenon je heliomo pere de katalitika ago de la fenikso-similaj elementoj, karbono kaj nitrogeno. Nia Suno troviĝas, nun, en tia stadio.

Tamen, frue aŭ malfrue, la tuta stelara provizo de hidrogeno estos elĉerpita. La kompakta kaj lumaj steloj, antaŭ ol ĉiuj aliaj, alvenas al tia kriza punkto de sia evoluo kaj komencas kuntiriĝi ellasante sian

pezofortan energion. En multaj kazoj tiu kuntiriĝo rezultigas en ĝenerala nefirmeco de la ĉielaj korpoj kaj, en brilegaj eksplodoj, ili eksplodas je kelkajn malgrandajn fragmentojn. Du miliardjaroj post la komenco de kreigproceso, oni trovas multajn tiajn stelfragmentojn senigitaj de hidrogeno: ili ĉiuj posedas ekstreme grandan densecon kaj tre signifan lumecon kaj estas konataj kiel "blankaj pigmeoj".

Sed nia Suno, kiu tre ŝpareme foruzas sian provizon de hidrogeno, estas ankoraŭ vigla kaj intencas vivi dekoble ol ĝi jam travivis. Tamen, ĝi, iompostome, iĝas pli kaj pli varmega kaj minacas forbruli ĉion sur la surfaco de la Tero post kelkda miliardjaroj, antaŭ ol ĝi transiros la maksimuman stadion de sia lumeco kaj komencos sin kuntiri.

Dum la malnovaj kaj troabundaj steloj mortas, certa kvanto da novaj steloj naskiĝas el la gasmaterio kiu restis post la primitiva proceso de la stelkreado. Sed, laŭ la forpaso de la tempo, la plimulto de la steloj apartenantaj al la nenombreblaj "stelinsuloj" pli kaj pli maljuniĝas.

Kaj la jaro 12.000.000.000 post la Kreado de la Universo, aŭ la jaro 10.000.000.000 de nia kristana epoko, vidos la sinfinan spacon maldense plenigita per la ankoraŭ finevoluantaj "stelinsuloj" konsistigantaj el la jam mortintaj aŭ ankoraŭ mortantaj steloj.

El angla lingvo esperantigis KOBO.

TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO

Post antaŭ duonjaro farita interkonsento, ke Denaska Esperantistaro kaj Tutmonda Junular-Organizo, ambaŭ aliĝintaj al IEL, intime kunlaborados, la estraro de TJO nun, post peto de la estraro de D.E. konsentis transpreni tiun organizon en TJO. D.E. ne malaperos en TJO, sed restos aparta fako en la organizo. La ĝisnuna D.E. — sekretariino. Sino C. P. Weston, 27 Cecil Rd., London — N. 10, Anglujo, restos en funkcio por daŭrigi la flegadon de Denaska Esperantistaro en TJO. La anaro de D.E. ricevos la organon "LA JUNA VIVO", kaj en ĝi aperos aparta rubriko por D.E.

Por ĉiuj D.E. — aferoj oni sin turnu do al la D.E. sekretariino. La membroadministrado iru ankaŭ pere de ŝi.

La nuna stato de kuniĝo estas multe pli fruktedona por celkonscia laboro. La por-junulara laboro, jam malfacila per si mem, renkontas multajn malfacilaĵojn pro la tutmondaj malfacilaĵoj. Tial la bonvola atento de la tuta Movado estas nepre necesa! La junularo ne mem povas porti la kostojn de eĉ plej ŝparema kaj modesta organizo. Aligu do al TJO la ĝejnulojn, kaj aligu mem kiel subtenanto!

Turnu vin por informoj kaj sciigoj al la landaj reprezentantoj aŭ rekte al la TJO — sekretario: M.v.d. Horst, Joh. Idastr. 32, Rotterdam, Nederlando.

CAMPANHA ZAMENHOF

Sumo jam publikigita	245 kruzejoj
S-anino Yolanda Araujo Costa	100 "
SUMO	345 kruzejoj

DR. ADOLPHO STAERKE
 Livre docente da Universidade do Brasil
Clínica de senhoras
Residência: RUA BELA S. LUIZ, 68
Tel. 48-5892

Consultório: R. ASSEMBLEIA, 58-1.
Tel. 42-3835

PALACE MÓVEIS

Exposição permanente de Móveis de fino gosto
P. M. RAWET & CIA. LTDA.
 Pc. das Nações 184 — R. Cardoso de Moraes 506-A
Bonsucesso RIO DE JANEIRO Ramos

Rio Esperantista

Orgão oficial da A E R J.

PENSAMENTO E TRABALHO PELA FRATERNIDADE UNIVERSAL

Diretor: Delio Pereira de Souza

Redator-Chefe: László Zinner

Assinaturas:

Brasil — Cr\$ 20,00
Exterior — U\$ 1,50
Ou 15 Coupões-resposta
Avulso — Cr\$ 2,00

Rio de Janeiro, Maio de 1948

ANO II — Edição mensal — N.º 14

Enderço: Caixa Postal 3677

Redação e administração
Rua das Marrecas, 19, 2.º and
Telefone 22-5300

ESPERANTO E RELIGIÃO

Por Alberto Flores,
Porto Alegre.

Falando, certa vez, a uma assembléia de estudantes, sobre Fraternidade, mencionei o incontestável valor do Esperanto como fator de aproximação internacional.

— “Esperanto — perguntou um deles — que é isso? Alguma religião?”.

Meditando depois sobre aquela pergunta, procurei encontrar a explicação de “porquê” aquele estudante achara que Esperanto devia ser uma religião.

A resposta nós temos no fato de, quase todo movimento visando a fraternidade e confraternização dos povos, ter fundamento religioso. Na verdade todas as grandes religiões pregam a harmonia entre os homens; e toda idéia destinada a afastar as barreiras causadoras dos desentendimentos prejudiciais à intercompreensão e cooperação entre as nações, está, direta ou indiretamente, de acordo com os ensinamentos de uma ou de outra corrente religiosa. Significa isto, que o ideal de fraternidade humana, visando uma melhora social, está diretamente ligado à elevação de sentimentos, à evolução espiritual. De fato, a quebra dos preconceitos deshumanos é princípio básico dos movimentos espiritualistas adiantados, característica daqueles que se libertaram do amor próprio, do egoísmo e da intransigência. Não é de causar espanto, pois, que o Esperanto, com a sua idealística “Idéia Interna”, que lhe dá vigor e constitui a sua alma, seja to-

mado pelos menos avisados como uma religião.

E' certo que o Esperantismo é um movimento neutro, mas nada impede que dêe participem religiosos. Pelo contrário, seria até para desejar, pois estes encontrarão no Esperanto um auxiliar valioso na divulgação de sua doutrina. O meio esperantista é um vastíssimo campo de ação, uma terra fértil e um ambiente propício aos ensinamentos elevados. O Ideal do Esperanto se casa perfeitamente com o Ideal das verdadeiras religiões, no que diz respeito à cordialidade e fraternidade entre os homens. O Esperanto é veículo precioso de aproximação e entendimento entre os homens e de popularização das grandes idéias e ideais humanos.

Não será nenhuma irreverência dizer-se, mesmo, que Esperanto é a religião da Cordialidade, o Culto da Fraternidade. O Esperanto participa, dum modo geral, do Espírito Universal que no seu determinismo norteia o homem para a evolução e para o progresso; pode, e deve, pois, ser utilizado por aqueles que trabalham por um homem de alma melhor e desejam uma Humanidade de alma mais nobre. Esperanto não é incompatível com nenhuma religião ou movimento espiritualista, portanto, pode e deve ser empregado por todos aqueles que, sinceramente e com tolerância, desejam divulgar os seus princípios morais sobre os quais se baseiam.

Inegavelmente, devemos

reconhecer que a Humanidade evolui. Lentamente, sem dúvida, mas incessantemente. O progresso dia a dia mais se manifesta em todos os setores, e no espiritual avançamos a cada instante.

Devemos reconhecer que nunca o movimento religioso obteve tanto avanço como nos últimos tempos. Todas as religiões constatarem o aumento cada vez maior do número de crentes. O Mundo marcha para a espiritualização. Os cépticos dirão que ainda estamos longe disto; mas haverão de reconhecer que estamos muitíssimo mais perto do que quando começamos e que bastante já se tem andado.

E a que devemos todo este avanço? Certamente que à linguagem humana. Sem ela não teríamos dado um passo à frente! Pensemos agora no quanto poderíamos estar mais adiantados se tivéssemos uma linguagem comum, universal, facilitando a divulgação das idéias e possibilitando um maior intercâmbio espiritual entre os homens, em vez do caos linguístico que existe!

Aqui o valor do Esperanto, como linguagem neutra auxiliar, se torna perfeitamente claro, compreensível, fazendo-nos ver o quanto seria útil para a Humanidade a adoção dessa maravilhosa obra prima de lógica e simplicidade, como segunda língua de todos os povos cultos e como notável meio de divulgação dos princípios reli-

LA SUKCESO

Verkis Karl Woznica
Germanujo.

La verkisto verkis romanon. La romano havis sukceson; ĝi estis laŭdata, legata kaj vendata. Ĝi eĉ estis tradukita en hispanan lingvon. Kaj ĉar la verkisto hazarde sciis tiun lingvon, li legis sian propran verkon ankaŭ en hispana lingvo. Hispanligve ĝi iom impresis lin kaj pro tio li ree tradukis ĝin en la germanan lingvon kaj, ho, vidu, ĝi fariĝis nova romano. Tiu romano estis filmita kaj la sukceso restis fidela al ĝi, kvankam la filmado malebligis rekoni la originalan temon. Nun la verkisto el la filmo faris teatraĵon. Saĝa kaj tre memstara reĝisoro igis sukcesi la teatraĵon — sed ĝi ja estis tute nova teatraĵo, malsimila al tiu de la verkisto, ai kiu tia aliformigo plaĉis tiel bone, ke li tuj faris rakonton el ĝi. Oni neniel povis riproĉi lin, eble nur tion, ke li verkoŝtelis sin mem. Sed, pri tio neniu ja pensis. La rakonto havis sukceson kaj pro la sukceso oni diris nenion malbonan, ĉar se oni tion farus, tiam la diraĵo estus malsukceso, ĉar la sukceso estas pli forta ol fidiraĵo. La rakonto inspiris direktoron de iu radistacio inciti la aŭtoron verki radiodramon. La aliformigo de la temo estis interesa. Spertaj raditeatristoj instigis ion similan kiel komedio. Oni nur iomete ampleksigis la temon kaj enigis malmultajn aliformigojn, kaj nun la komedio estis kompleta. Ĝi estis prezentata en Ameriko kaj donis materialon por nova romano, kiu ankaŭ havis sukceson. Nun la verkisto faris el lia malnova skizo bazon por grandioza satiraĵo. Ĝin li nomis “La Sukceso”. Tiu libro estas ankaŭ filmota nun. La kritiko laŭdegas la verkiston pro la riĉeco de liaj elpensoj.

giosos de elevaĉo moral e espiritual..

Oxalá os dirigentes espirituais do mundo, consciencientes das suas responsabilidades, reconheçam o valor do Esperanto e se disponham a adotá-lo e propagá-lo, apressando, assim, a marcha ascensional do Homem.